

BULGARA ESPERANTISTO

MONATA TEKNIKA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Redaktoro: **D-ro Zah. Zahariev**
Adreso: Sofio, Poŝtenska kutija 233

Jarabono: 10 bulgaraj levoj,
0.50 sv. fr. aŭ egalvaloro

Al laboro!

La deksepa Bulgara Esperanto-Kongreso en Sofio, kiu brile finis sian laboron, estis ĝojiga fenomeno en nia movado. Ĝi elokvente konvinkis nin ke la idea krizo, kiu turmentis nian organizon, estas jam je sia fino. Post la periodo de dekadenco, kiun travivis nia movado dum la lastaj jaroj, venas periodo de nova progreso, kies unuajn simptomojn ni vidis dum la ĉi-jara kongreso. Esperanto staras antaŭ novaj venkoj kaj konkeroj. La granddimensia disvastiĝo de la radio kaj de la parolanta filmo ankoraŭfoje akcentis konvinkige la bezonon de internacia lingvo. La lasta venka svingbato estas nia. Niaj societoj estas plifortigendaj, por ke ni estu sufiĉe fortaj deŝiri la venkon, kiun, kiel maturan frukton, prezentas al ni la vivo de la kultura socio.

Unu el la plej gravaj okazintaĵoj en la esperantista vivo dum la lastaj jaroj estis la I Konferenco de la es-

perantistoj el la balkanlandaj ŝtatoj, kiu okazis dum la ĉi-jara kongreso. Tiu konferenco malfermas novan paĝon en la historio de nia movado. Sur la principoj pri kultura kunlaboro inter la balkanaj popoloj ni eklaboros por la konstruo de la majesta domo de la paco sur la Balkanoj — ideo kaj revo — sur kiun ĝis nun la negativaj flankoj de la vivo konstante jetis sagojn kaj faris atencojn. La I Balkana Konferenco en Sofio kaj la balkana revuo — organo de la balkanaj esperantistoj — kiu kredeble komencos aperi la 1 de Januaro 1931 en Sofio, estas la fundamenta ŝtono, sur kiu elkreskos la belega konstruaĵo de nia idealo.

Al laboro, esperantistoj!

— por Esperanto!

— por la kultura progreso
de la homaro!

D-ro Zah. Zahariev

XVII Bulgara Esperanto-Kongreso – Sofio, 1930

okazis la 12 kaj 13 de Julio en la universitata aŭditorio № 45. Partoprenis ĉ. 200 esperantistoj, inter ili 40 regulaj delegitoj. Ĉeestis delegitoj el *Jugoslavio*: s-o D-ro Jakob Ste-

panĉiĉ, s-ino Stepanĉiĉ kaj s-o Davidoviĉ; el *Greklando*: s-o Spatharis kaj s-o L. Polizoides; el *Rumanio*: s-o Eŭgeno Robin kaj s-o Koch.

La kongreson malfermis per salut-

parolado la prezidanto de BEA s-o Illia Silvestriev. Estis elektita kongresstraro: prez. Atanas D. Atanasov—Ada, vicprez. Vi. Lazarov—Vidin, honoraj vicprezidantoj: s-oj Stepan-čič, Spatharis kaj Koch, sekretarioj: Dočo Dimitrov—Orehovo, f-ino Siava Bojilova—Samokov, Nikola Hubenov—Plovdiv. Estis elektitaj komisionoj pri la rajtlgiloj, presorgano, budĝeto, ŝanĝoj en la statuto, estonta agado.

Post mallongaj diskutoj la raporto de la C.K. kaj K.K. estis akceptitaj kaj la komitatoj liberigitaj de respondec.

En la ĝenerala diskutado pri la estonta agado partoprenis D-ro St. Kadiev—Sliven, Krum Ivanov—Vraca, Nikolaj Vasilkov—St. Zagora, V. Komerčero—Plovdiv, Jak Behar—T. Pazarĝik, D-ro Zah. Zahariev—Sofia, Illia Silvestriev—Ŝumen, Ivan Sarafov—Kazanlik, Hugo Bär—Sofia. La komisiono pri la estonta agado prenis noton de la esprimitaj opinioj kaj prezentis sian planon pri estonta agado, kiu estis akceptita unuanime:

1. La XVII kongreso de la bulgaraj esperantistoj konstatas, ke la esperantismo en Bulgarujo konstante progresas, sed ke la organizaĵo de la bulgaraj esperantistoj ankoraŭ estas en dekadenco. Konsiderante la gravecon de la organizita movado, kiu ŝparas fortojn kaj rimedojn kaj donas senmezure pli grandajn rezultojn, la kongreso varme alvokas ĉiujn bulgarajn esperantistojn aliĝi al la lokaj esperantistaj societoj, kaj ĉiujn lokajn societojn aliĝi al la Bulgara Esperantista Asocio.

2. La kongreso apelacias al ĉiuj esperantistoj eniri en BEA kaj ĝiajn sekciojn nur kiel esperantistoj, flankentlasante ĉian dividon je kiaj ajn grupoj kaj apartenecoj, kun sento de plena toleremo kaj amikeco al ĉiu esperantisto. La kongreso alvokis ĉiujn esperantistojn kaj societojn doni

senrezerve sian moralan kaj materialan helpon al la nova Centra Komitato por ke tiu ĉi povu plenumi la taskojn komisiatajn al ĝi.

3. La kongreso trovas ke la perfekteco de la lingvaj konoj devas esti idealo de ĉiu esperantisto kaj ke la lokaj societoj devas doni specialan atenton al tiu afero. Por atingi tion estas rekomendataj la sekvantaj rimedoj:

a) ke en la societaj kunvenoj oni pritraktu ankaŭ lingvajn demandojn;

b) ke la apartaj societoj havigu al si gramofonajn diskojn kun esperanta teksto; same estas rekomendate al la societoj utiligi laŭeble radioaparatojn por aŭdigi al siaj membroj esperantan parolon el diversaj landoj;

c) ke la esperantistoj aliĝu al la lokaj legejoj kaj klopodu kiel iliaj membroj por la kreo de speciala esperant-literatura fako ĉe la librejoj.

4. La kongreso trovas, ke la gvidantoj de diversaj kursoj de Esperanto en la lando ne ĉiam havas la necesan preparitecon kaj perfektan konon de la lingvo. Ĝi rekomendas al la Centra Komitato pristudi la demandon kiamaniere povus esti altigata la lingvokona nivelo de la kursgvidantoj, kaj same la demandon pri aranĝo de speciala kurso por kursgvidantoj.

5. La kongreso atentigas ĉiujn societojn pri la neceseco aranĝi nepre regulajn ĉiusemajnajn kunvenojn, teni la lokajn esperantistojn en senĉesa kontakto, vivigi la kunvenojn per taŭgaj okupoj, prelegoj, ludoj, kantoj k. t. p. La kongreso rekomendas al ĉiuj societoj la esperantajn ekskursojn kaj speciale la vizitojn al proksimaj urboj kaj vilaĝoj kun propaganda celo.

6. La kongreso esprimas la deziron, ke en la organo de BEA estu pritraktataj regule kaj sisteme la de-

mandoj pri societa vivo, rimedoj por la konservo de la varbitaj esperantistoj, metodoj de instruado en kursoj, metodoj de perfektigo de la lingvaj konoj de la bulgaraj esperantistoj.

7. La kongreso rekomendas, ke la BEA subtenu vojaĝantajn lertajn propagandistojn kaj invitu s-on A. Ĉe fari siajn kursojn en Sofia.

8. La kongreso insistas, ke dum la jaro estu realigata la ekzamena komitato ĉe la Asocio.

9. Konsiderante, ke en kelkaj urboj kaj vilaĝoj la lokaj aŭtoritatoj ankoraŭ kaŭzas malhelpojn al la esperantistoj por ilia organizita agado, la kongreso rekomendas al la Centra Komitato atente esplori ĉiun similan okazon kaj, konvinkiginte, ke la lokaj esperantistoj ne donis motivon por tia traktado, ĝi klopodu plej energie antaŭ la respektivaj faktoroj por forigo de tia malfavora traktado.

10. En konkludo la kongreso direktas varman vokon al ĉiuj bulgaraj esperantistoj: Sufiĉe da letargio! Venis la tempo por denova ekfloro de nia movado. Ni estos granda forto, se ni agos unuigite kaj organizite. Al laboro en urboj, urbetoj kaj vilaĝoj!

La komisiono pri ŝanĝoj en la statuto deklaris, ke ĝi ne trovas necese ŝanĝi la statuton.

La komisiono pri la budĝeto proponis la pasintjaran budĝeton, kiu estis akceptita kun kelkaj ŝanĝoj. La kongreso rajtigas la novan CK elspezi pli grandajn sumojn ol la votitaj respektivaj elspezaj paragrafoj, se la enspezoj estos pli grandaj.

La komisiono pri la presorgano proponas al la kongreso, ke ĝi rajtigu la CK pristudi la demandon pri komuna balkana organo, kaj kiam la kondiĉoj permesos, komenci ĝian eldonadon. Konforme al tio la CK eldonu „Bulgaran Esperantiston“ kiel teknikan organon bultenon.

La kongreso elektis novajn Centra

kaj Kontrola Komitatojn. Centra Komitato: s-oj G. Aktarĝiev, At. D. Atanasov — Ada, D-ro At. D. Atanasov — Agro, D-ro Zah. Zahariev, Hugo Bär, B. Veliĉkov kaj s-ino B. Marinova. Rezervaj membroj: B. Vasilev kaj Teo Popov. Kontrola Komitato: D. Simeonov, Kiro Georgiev kaj G. Gaŝevski. Rezerva membro Petr Ĉoĉev.

Diversaĵoj. La kongreso esprimis dankon al s-oj D. Malĉev — Plovdiv kaj Iv. H. Krestanov pri ilia poresperanta laboro; al la ĝisnuna Centra Komitato ankaŭ por ĝia laboro; al la Ministro de la Komerco pri la montrita preteco eldonigi en Esperanto per la Turlsta Oficejo ĉe la Ministerio gvidlibron tra la bulgaraj kuraclokoj.

S-o Georgi Oreŝkov deklaris ke li donacas al la Asocio siajn librojn, kiujn li donis al ĝi antaŭ kelkaj jaroj por disvendo. La kongreso per aplaŭdoj dankis al s-o Oreŝkov. D-ro Z. Zahariev proponis ke la Asocio donacu sian bibliotekon al la sofia legejo „Hr. Botev“, kiel jam faris la Sofia Esperantista Societo, klarigante, ke tiamaniere konserviĝos pli bone la libroj, kiujn minacas disperdiĝo ĉe la nunaj cirkonstancoj. Post diskutoj la kongreso decidis donaci la Asocian bibliotekon al la sofia legejo „Hr. Botev“. La kongreso komisias al la estonta Centra Komitato daŭrigi la provojn kolekti la sumojn suldatajn al la Asocio.

S-oj Stepanĉiĉ kaj Spatharis per varmaj vortoj esprimis sian kontentecon de la kongresaj laboroj.

La prezidanto At. D. Atanasov — Ada fermis la kongreson per mallonga parolado, akcentante ke tio estas la unua esperantista kongreso en Bulgario, en kiu la laborkunsidoj altiris tiom da Interesemajn samideanojn, kaj kiu estas fermata ĉe samtiom da ĉeestantoj, kiom estis ĉe la malfermo; en tio li vldas signon, ke vere venas denove epoko de serioza poresperanta laboro.

Unua Balkana Esperanto-Konferenco—Sofia, 13-an de Julio 1930

PROTOKOLO

Hodiaŭ, la 13-an de Julio 1930, en aŭditorio № 45 de la Bulgara Ŝtata Universitato en Sofia la prezidanto de la XVII Bulgara Esperanto-Kongreso s-o At. D. Atanasov anoncis la Balkanan Esperanto-Konferencon malfermita kaj proponis kiel ĝian prezidanton s-on Ilia Silvestriev, kiu okupis sian prezidlokon.

La prezidanto per mallonga parolado prezentis la gravecon de la konferenco kaj proponis la jenajn punktojn por pridiskuto:

1. Rimedoj por propagando
2. Maniero de agado antaŭ la registaroj kaj la oficialaj institucioj.
3. Esperanta telegrafa kaj poŝta unuiĝo sur la Balkanoj.
4. Enkonduko de Esperanto en la lernejoj.
5. Komunaj iniciativoj.
6. Interŝanĝo de esperantistoj.
7. Aranĝo de ekskursoj.
8. Kunvoko de Balkana Esperanto-Kongreso.

S-o Stepančić (Beogrado) salutas la ideon pri la konferenco balkana. Li rekomendas iniciaton de nova organiza formo sur bazo de amasa movado. Proponas, ke la diskutoj estu protokolataj.

S-o Spatharis (Saloniko) salutas la ideon kunvoki balkanan konferencon; opinias, ke en la diskutoj ekstaros la solvotaj demandoj.

S-o Eug. Robin (Bukureŝto) salutas la konferencon.

S-o At. D. Atanasov — Ada parolis pri la ideo de balkana unuiĝo, pri la stato de la movado en la diversaj balkanaj landoj kaj pri la tie sekvataj metodoj de propagando kaj organizo. Mencias spertojn el la bulgara movado. Priparolas la financon

flankon de la demando pri organiza unuiĝo. Rekomendas ne formigon de nova organizajo, sed starigon de konstanta kontakto inter la balkanaj esperantistaroj, regulan reciprokan informadon pri ĉiuj iniciativoj, paraleligon de la klopodoj ĉe iniciativoj, kiuj rilatos plurajn landojn, ĉiujarajn balkanajn Esperanto-Konferencojn. Konsideras kiel komencajn punkton por tia agado la kreon de komuna balkana esperantista gazeto.

S-o Ilia Silvestriev trovas, ke balkana esperantista organizajo estus pli utila al la movado en la balkanaj landoj, ol la nuna I. C. K.

S-ro D-ro St. Kadiev montras la idecon de la esperantista movado kaj atentigas pri la sama ideo bazo de la interbalkana esperantista proksimiĝo. Por formala organizajo estas ankoraŭ frue pensi. Preferinde estas instigi la esperantistojn al persona interkonatiĝo kaj al plioftiĝo de la komuniko inter la membroj de la esperantistaj asocioj en la balkanaj landoj. Proponas eldoni ne gazeton, sed bultenon.

S-o D-ro Z. Zahariev insistas pri kreo de komuna organo, konsiderante ankaŭ la grandan propagandan signifon de ĝia ekzisto mem. La balkanaj popoloj ne konas sin reciproke, ili pli bone konas la literaturojn kaj vivon de malproksimaj popoloj, ol tiujn de siaj najbaraj landoj.

En la konferencojn venas jus alveturinta rumana samideano s-o Koch (Giurgiu). Post saluta parolo la diskutoj estas daŭrigataj.

S-o At. D. Atanasov citas la artikolon pri balkana esperanto-gazeto en „Bulgara Esperantisto“, № 10 de 1924 jaro.

Prez. s-o Ilia Silvestriev legas la oficialan leteron de la esperantista societo en Zagrebo de la 12 de oktobro 1929, per kiu estas proponata eldono de komuna gazeto de la apuddanubaj landoj. Oni legas ankaŭ numeron 3 — 5 de la gazeto „Konkordo“ de 1929, en kiu la artikolo „Danubo“ rekomendas koncentrigon de la materialaj kaj moralaj fortoj por eldoni ampleksan esperantan gazeton.

S-o Hugo Bär konstatas la malbonan staton de preskaŭ ĉiuj esperantaj organoj en la balkanaj landoj, escepte tiu en Grekujo. Trovas, ke la racia solvo estas unuigo de la fortoj kaj eldono de unu komuna gazeto.

S-o Dim. Simeonov konsideras la proponon pri komuna gazeto akceptenda. Proponas planon de la eldono: ĉiu lando, partoprenanta en la eldono, prezentos membron en la redakcia komitato. Unu ĉefredaktoro estos montrita en la lando, kie fakte estos eldonata la gazeto. Antaŭvidas grandan sukceson de la gazeto, se ĝi estos en spertaj manoj. Por organizi serioze la aferon estos necesa komence fonda kapitalo de 20,000 bulg. levoj. Proponas, ke la konferenco votu rezolucion por fondo de komuna balkana gazeto.

S-o Eug. Robin ne povas ankoraŭ doni definitivan opinion pri la

balkana gazeto. Li raportos al la organizaĵo de la rumanaj esperantistoj kaj oni respondos skribe.

La prez. Il. Silvestriev klarigis, ke la Bulgara Esperantista Asocio povas por si ankoraŭ nun decidi la demandon; la reprezentantoj de la alilandaj esperantistaroj diskutas kaj proponas, sed ankoraŭ ne ligas la respektivajn organizojn per iaj decidoj. Por ili la decidoj estas prenataj „ad referendum“.

S-o Davidoviĉ (Beogrado) asertas, ke la jugoslavaj esperantistoj akceptos la iniciativon pri komuna gazeto.

La propono pri kreo de komuna balkana esperantista gazeto estis votita de la bulgaraj esperantistoj kaj akceptita unuanime de ili.

Laŭ propono de la prez. s-o Il. Silvestriev la konferenco elektis komisionon, kiu havos la taskon elabori detalan planon pri la estonta balkana gazeto. La komisiono konsistas el ĉiuj eksterbulgarujaj partoprenantoj en la konferenco kaj de la sekvantaj reprezentantoj de bulgara flanko: At. D. Atanasov — Ada, Ilia Silvestriev, D-ro Z. Zahariev kaj Dim. Simeonov.

Je la 12-a horo la prezidanto fermis per kelkaj vortoj la konferencon.

Prezidanto: *Il. Silvestriev*

Sekretario: *D. B. Dilov*

Komuna Balkana organo

Dum la I Konferenco de la balkanlandaj esperantistoj oni esprimis deziron eldoni komunan organon. Estis elektita komisiono por pristudo de la demando. La komisiono decidis inviti la esp. asociojn de Jugoslavio, Rumanio, Greklando, Albanio, Turkio kaj Bulgario al komuna laboro. La komisiono decidis, ke la balkana revuo komencu aperadi ekde la 1 de Januaro

1931. Ĉiu lando havos sian redaktoron, kiu zorgos pri sia parto de la materialo. Unu ĉefredaktoro zorgos pri la tuta revuo. La revuo aperados en Sofio.

En la sekvanta numero de BE ni donos detalojn pri la disvolvigo de la demando pri komuna organo.

Presejo „POSREDNIK“ — Sofio

„Balkana konkordo“

Al la samideanoj estas jam konate pri la decidoj de la I-a Balkana Esperanto-Konferenco, kiu okazis ĉi-jare en Sofia.

Dum ĝi oni forte insistis pri la neceso de agado por aktiva balkana kunlaboro kaj kiel unua reala esprimo de tiu rimedo estu fondata komuna organo de balkanaj esperantistoj. Ĉies opinio estas ke nur la esperantistoj de ĉiuj balkanaj landoj metos la fundamenton de la sopirata balkana konkordo.

La decido tiurilata de la I-a Balkana Esperanto-Konferenco estas jam sankciita de preskaŭ ĉiuj balkanlandaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj akceptas la iniciaton kun vera entuziasmo kaj sincera ĝojo. Ili rajtigas la Bulgaran Esperanto-Asocion fari la pluan paŝon al efektivigo de la simpatia iniciato kaj la lasta prenis la rilatajn decidojn en sia lasta kunsido.

Laŭ tiu decido:

La komuna balkana organo havos la titolon „*Balkana konkordo*“.

Kiel direktoro de la gazeto, al kiu estas komisiite plenrajte zorgi por la materiala kaj morala sukceso de la revuo estas elektita s-o Dimitr Simeonov, iama sekretario de Bulgara Esperanto-Societo.

Kiel ĉefredaktoro estas montrita s-o D-ro Zahari Zahariev, nuna sekretario de Bulgara Esperanto-Asocio.

Al tiuj ĉi du personoj estas komisiite tuj alpaŝi al la necesaj preparaj laboroj — trovo de garantia kapitalo, organizo de redakta kaj alia laboro, kun la

konto, ke la unua numero povu aperi je Novjaro.

Tial, ĉiuj bulgaraj samideanoj estas petataj jam nun sendi kion ili povas por la garantia kapitalo — tian ni devas kolekti almenaŭ 20,000 levojn. Granda estas la tasko, sed ni mem devas zorgi pri ĝia realigo — ni mem devas certigi la materialan ekziston de la gazeto. Do, ĉiu kiom povas, 50, 100, 500, 1000 levojn, bonvolu tuj sendi, por ke ni povu komenci kaj efektivigi la iniciaton.

La abonpago por Bulgarujo estos 80 levojn por jaro. Oni povas jam nun alpaŝi al kolekto de abonpagoj.

La adreso de „*Balkana konkordo*“ estas: *Poŝtenska kutija, № 233, Sofia.*

La samideanoj bonvolu skribi sur apartajn foliojn pri administraj kaj redakciaj demandoj.

Pro la apero de „*Balkana konkordo*“ kiel komuna organo de ĉiuj balkanaj esperantistoj, estonte „*Bulgara Esperantisto*“ aperos nur en 4 paĝoj, kiel teknika organo, kaj kostos nur 10 levojn por jaro.

Ĉiu bulgara esperantisto devas ĝin aboni.

— Tiu ĉi numero estas duobla. Aparta ekzemplero kostas 2 lv. La sekvanta numero aperos je la fino de Oktobro antaŭ la Verda Semajno.

Esperanto - Biblioteko

ĉe legejo „Hr. Botev“
en Sofio

Ĉe la legejo „Hr. Botev“ en Sofio estas fondita Esperanto-Biblioteko. Ĝi konsistas el libroj kaj gazetoj donacitaj de la Sofia Esperantista Societo, de Bulgara Esperantista Asocio kaj de apartaj samideanoj. Ĉe la legejo estas fondita esperantista grupo, kies celo estas zorgi pri la pliriĉigo de la biblioteko. La ĉefa celo de la biblioteko estas kolekti ĉiujn ĝis nun aperintajn en Bulgario en kaj pri esperantajn librojn, havigi al si ĉiujn novaperantajn esperantajn librojn kaj gazetojn kaj tiamaniere doni al la sofia samideanaro diversan kaj riĉan legaĵon. Per tio la biblioteko celas levi la lingvan nivelon kaj pliriĉigi la konojn de la esperantistoj. Ĉiu esperantisto, kiu pagas 5 levojn monate, estas membro de la legejo kaj de la esperanta grupo kaj rajtas uzi la neesperantan kaj esperantan bibliotekojn.

La esperantistaj societoj kaj eldonejoj estas petataj donaci al la biblioteko siajn eldonaĵojn. Ankaŭ apartaj samideanoj, kiuj povas donaci librojn al la biblioteko, faros grandan servon al la movado.

Adreso: Legejo „Hr. Botev“ — Esperanto-grupo, Sofio, str. Car Simeon 139, Bulgario.

Pri „Literatura Mondo“

Dum decembro, j. k., komencos denove aperi la gazeto „Literatura Mondo“ sub la redaktado de Kolomano de Kolocsay kaj Julio Baghy. La entrepreno estas me-

tita sur solida financa bazo kaj la eldono de la gazeto estas garantiita. Jara abonpago 10 pengö (2 dolaroj aŭ 250 lv. bulg. Adreso de la administrejo: Budapest IX. Boráros-tér 6, IV. 11.

La reapero de tiu bela arta gazeto estas grava fakto en nia movado kaj ni kredas ke ĝi estos renkontata kun ĝojo de ĉiu esperantisto.

Verda Semajno -

26 de Oktobro ĝis 1 de Novembro

En sia lasta kunsido la CK de BEA decidis, ke la semajno de 26. X. — 1. XI. estos la tradicia propaganda Verda Semajno por la tuta lando. La societoj estas petataj kolekti sumojn por propagandiloj (afiŝoj k. a.) kaj sendi ilin al BEA.

Averto. Kiel oni scias, depost la kongreso la centro de BEA estas en Sofio. Apartaj samideanoj kaj ĉiuj esp. societoj estas petataj pri asociaj aferoj turni sin rekte al la adreso: BEA, Poŝtenska kutija 233, Sofio.

Esperanta literaturo (libroj, gazetoj kaj ĵurnaloj) estas je la dispono de la sofiaj esperantistoj ĉiutage de la 4 — 8 h. vespere en la salono de Legejo „Hr. Botev“, str. Car Simeon 139.

Universala kongreso. La 22 Universala Esperanto-Kongreso kaj la Somera Universitato okazis de la 2—9 de Aŭgusto en Oxford, Anglujo. Partoprenis 1200 esperantistoj el 30 landoj kaj el ĉiuj kvin kontinentoj. Rezentanto de la bulgaraj esperantistoj estis s-o P. G. Pamporov.

Centra Komitato

La Centra Komitato de BEA konstituiĝis jen: prez. s-o G. Aktarĝlev, vicprez. D-ro At. D. Atanasov — Agro, sekretario-kasisto D-ro Z. Zahariev kaj membroj: s-ino B. Marinova kaj s-oj Hugo Bär, Boris Veliĉkov kaj Boris Vasilev.

S-o At. D. Atanasov — Ada ekzistis pro privataj motivoj kaj pro manko de libera tempo. Li promesis laŭpovoni sian subtenon al la CK kaj al

la movado.

La unua rezerva membro s-o B. Vasilev okupis la lokon de la ekzistinto.

Kiel redaktoro de „Bulg. Esperantisto“ estas elektita D-ro Zah. Zahariev.

„Bulgara Esperantisto“ komencu aperadi en la ĝisnuna formato, sed 4 paĝa, kaj estu redaktata kiel teknika organo de BEA. La jarabono estas fiksita je 10 bulg. levoj.

Bulgara Esperanto-Instituto

Laŭ propono de D-ro Zah. Zahariev, la CK de BEA fondis Instituton de Esperanto en Bulgario. Ĝi estas la ĉefa kompetenta prilingva organizajo en nia lando. La Instituto konsistas el la sekvantaj fakoj:

1. *Ekzamena Komitato*, kiu zorgas pri la instruado de Esperanto kaj faras ekzamenojn laŭ speciala programo.

2. *Recenza Komitato*. Ĝi revizias manuskriptojn de aperontaj libroj kaj zorgas ĝenerale pri la lingva kaj stila korekteco de la esp. eldonaĵoj. Samtempe ĝi recenzas kaj rekomendas novaperintajn esp. librojn.

3. *Historia Komitato*. Ĝi kolektas materialojn pri la historio de la esp. movado en Bulgario por helpi la

verkon de plena historio de nia enlanda esp. movado.

4. *Bibliografia Komitato*. Ĝi zorgas pri la bibliografia priskribo de ĉiuj aperintaj libroj, gazetoj k. a., kiuj koncernas Esperanton. Ĝi faras nomarojn de ĉiuj artikoloj kaj verkoj laŭ la fakoj, kiujn ili tuŝas (sciencia, teknika, literatura k. a.).

5. *Vortara Komitato*. Ĝi zorgas pri la verko de plena Bulgara-Esperanto Vortaro. Ĝi respondas al ĉiuj demandoj pri la signifoj de vortoj, pri la traduko de bulgarlingvaj vortoj kaj esprimoj.

Ĉiu komitato funkcias laŭ speciala regularo. Detalojn pri la Instituto de Esperanto ni donos en la sekvantaj numeroj de „B. E.“.

Sciigoj

— La sofiaj esperantistoj kunvenas ĉiusemajne jaŭde je la 7^{1/2} h. vespere en la salono de la legejo „Hr. Botev“, str. Car Simeon 139.

— Baldaŭ aperos nova „Lernolibro de Esperanto“, verkita de D-ro Zah. Zahariev laŭ la parola metodo de Andreo Ĉe. La lernolibro estas ilustrita kaj havas 316 bildojn en la teksto.

— La societoj estas petataj abonigi ĉiujn siajn membrojn al „Bulgara Esperantisto“, ĉar la jarabono estas ridinde malalta—10 levojn.

Ricevitaj libroj kaj gazetoj:

Internacia Stenografisto, Julio 1930; Hungara Heroldo, № 5, 1930; Internacia Socialista Kunbatalo (ISK), № 7, 1930; Schola et Vita, № 6—7, 1930. (Sekvos)